

相互共存するいのち

Vivo kiel Inter-estado

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

ダライ・ラマ14世とならんで世界的に有名な僧侶にティク・ナット・ハンという方がいます。本誌では334号から356号にかけて、その多くの著作から2点を選んでエスペラント訳して掲載しました。

ティク・ナット・ハン師はベトナム出身の禅僧で、ベトナム戦争の戦禍をくぐりながら平和を訴え、パリ和平会議でベトナム仏教徒主席として交渉にのぞみましたが、南北ベトナムに停戦を呼びかけたため、北ベトナムから帰国を拒否され、そのままフランスに亡命を余儀なくされました。現在はアメリカとフランスに活動拠点をしています。

師はベトナム戦争中、自分は僧侶として寺の中で修行を続けるべきか、戦争に苦しむ人々を助けて平和運動に身を捧げるべきか、悩んだといいます。その結論は、両方ともやる、ということでした。しかも、その両方をバラバラにするのではなく、互いに不可分の関係にあるものとして関わったのです。ここから「行動する仏教」がスタートしました。

Thich Nhat Hanh estas tiel mondfama kiel la 14-a Dalai-lamao. Nia bulteno jam aperigis du el liaj multaj verkoj en Esperanto, de la 334-a ĝis la 356-a numero.

Thich Nhat Hanh estas zen-budhisma monaĥo el Vjetnamio. Li apelaciis por paco, trapasante militan kaoson de Vjetnamio, kaj partoprenis en la Pac-konsiliĝo en Parizo kiel la reprezentanto de vjetnama budhanaro. Al li tamen estis rifuzita reveni al Norda Vjetnamio, la patrio, ĉar li postulis de ambaŭ Vjetnamioj ĉesi batalon. Tial li estis devigita resti en Francio. Nun li metis sian bazon de agado en Usono kaj Francio.

Dum la Vjetnama Milito li estis ŝanceliĝanta, ĉu li devas resti kiel monaĥo en templo, aŭ ĉu sin oferi al pacmovado por savi suferantajn homojn pro la milito. Lia decido estis entrepreni ambaŭ, ne kiel du apartajn kaj sendependajn sed kiel inter si rilatantaj kaj kunigitajn. Jen la komenco de "engaĝiĝinta budhismo".

「仏教は四聖諦を教える宗教である。ベトナム仏教徒はこの四諦の新しい解釈に踏み込んだ。苦、苦の原因とは何か。従来の仏教では苦の原因は個人の無明や煩惱であった。しかしベトナム戦争の真っ最中、民衆の苦しみを見ていて、果たして心のなかの無明や貪欲が生んでいるのか。苦の原因を追究していくと、個人的なものだけでなく社会に原因があるのは明白でないか。社会的な原因に目をつぶる仏教であっていいのか。苦の原因を追究していくと、社会の構造、不条理に原因があるなら、それを取り除くために立ちあがるのは、仏教徒である証でないのかという結論に達した。」

「行動する仏教」は単に街頭で活動するわけではなく、瞑想を重視しません。瞑想とは無念無想になることではなく、「気付き」(mindfulness)とあって、世界や自分の存在や生滅を注意深く観察していくことです。師はこう言います。「もしあなたが詩人であるなら、この一枚の紙の中に、雲が浮かんでいるのを見るでしょう。」

どうということかということ、雲→雨→木→紙、というようにつながっていて、そのつながりに気付いていく、これが瞑想です。すると、自分のいのちは、けっして単独にあるわけではなくて、太古のいのちを受け継ぎ、かつ世界の人々のいのちとつながりあっていることを明確に意識することができます。これを師は"inter-being"とあって

"Budhismo estas la religio, kiu predikas pri la Kvar Noblaj Verroj. Vjetnamaj budhanoj ekmarŝis al nova kompreno pri la Kvar Verroj. Kio estas suferado, kaŭzo de suferado? Ĝisnuna budhismo klarigis, ke la kaŭzo de suferado estas malvido kaj kleŝo de individuo. Sed dum la vjetnama milito mi vidis suferojn de popolo. Ĉu ilin vere naskas malvido kaj avido en koro? Se ni serĉadas kaŭzojn de suferoj, evidentiĝas, ke ili ne nur estas individuaj sed ankaŭ sociaj. Ĉu budhismo ignoras sociajn kaŭzojn? Tiel konsiderante mi atingis la konkludon ke budhanoj devas ekstarti por ekskludi suferojn kaŭzatajn de socia strukturo aŭ de socia maltracio."

"Engaĝiĝinta budhismo" ne sole signifas surstratan agadon, sed emfazas meditado. Ĉi tie meditado ne celas resti en nenia penso. Ĝi estas observado de la mondo kaj de la memo, aŭ de ilia estiĝo kaj malestiĝo, do ĝi estas nomata ankaŭ *mindfulness* (atentemo). Li diras: "Se vi estas poeto, vi povas vidi ŝvebantajn nubojn sur tiu ĉi papero."

Kion signifas tio ĉi? Nubo, pluvo, arbo, papero; ili estas laŭvice ligitaj, kaj meditado estas atente rigardi tian ligan. Tiamaniere oni povas klare konscii, ke ilia vivo ekzistas ne per si mem sola, sed heredis praajn vivojn kaj sin ligas kun ĉiuj vivoj en la tuta mondo. Tion ĉi li nomis *inter-being*: en Esperanto "inter-estado". Ĝi signifas,

います。「お互いにある」という意味で、「相互共存」と訳されています。日本でも昔から「おかげさまで」といっていますが、相互共存するいのちを見出すことは、単にありがたいと感謝することではありません。世界が苦難にあえいでいる時に、戦争や貧困や環境破壊で苦しんでいる時に、自分だけが安泰であることはありえない、と気付くことです。そして、自分自身の暮らしが世界にどう影響を与えるだろうかということまで気付くことです。

社会苦の解決のために、私たちが忘れてはならないことがあります。それは、人間というのは善悪ともにある存在だということです。私たちは縁起的存在ですから、条件次第ではいかようにもなりえます。人殺しにもなりえるのです。しかしともすれば、私たちは常に自分を正義として主張し、意見があわない相手を断罪しがちです。これが実は争いを生むのです。加害者だけを責めても、また被害者だけに立っても社会苦は解決しない。被害者であり、加害者でもあるというような目覚め、智慧に支えられて慈悲を实践することによって社会苦を解決していくことが大事なのです。敵か味方か、被害者か加害者かという安易で誤った二分法に陥るべきではありません。

ke ĉiuj estaĵoj eblas nur per interrilato. Ni japanoj ofte diras *okagesamade*, t.e. "dank' al". Ekzemple, "mi fartas bone, dank' al vi." Trovi interrilatantajn vivojn aŭ inter-estadon tamen ne simple signifas danki pro sia feliĉo. Dum la mondo suferas pro milito, malriĉeco, detruigo de medio, ne povas esti ke mi sola estas feliĉa kaj sekura. Ni devas konscii tion ĉi, kaj rimarki ankaŭ ke nia vivmaniero donas ian efikon al la mondo.

Ni devas ne forgesi unu aferon por solvi sociajn suferojn. Tio estas ke homo estas estaĵo enhavanta bonon kaj samtempe malbonon. Ĉar ni estas estaĵo laŭkondiĉa, kondiĉoj eksteraj povas difini nin ĉiel ajn. Ni povas fariĝi eĉ murdisto. Sed ni inklinas aserti nian pravecon kaj riproĉi kontraŭopiniantojn. Tiu ĉi sinteno mem naskas konfliktojn. Se ni kritikis nur suferantojn, aŭ se ni subtenas nur suferantojn, sociaj suferoj ne povas esti solvitaj. Estas necese konsciiĝi pri la fakto, ke ni estas ne nur suferantoj sed ankaŭ suferigantoj. Surbaze de tiu ĉi saĝo ni devus praktiki kompaton kaj tiel solvadi sociajn suferojn. Ni devas ne enfali en la facilan pens-manieron de "falsa alternativo", kiu rigardas homojn laŭ la divido "ĉu amiko aŭ malamiko", aŭ "ĉu suferanto aŭ suferiganto".